

**Ni invitas vin partopreni en staĝo
por la gvidontoj-ĉiĉeronoj, iliaj helpontoj, kaj la tradukontoj,
por la turisma programo de la Universala Kongreso en Lillo en 2015.**

Gvidos la staĝon profesiulino pri turismo, homaj rilatoj kaj trejnado.
La akiritaj kompetentoj utilos ie ajn, inter alie por prepariĝi al la faka branĉo
"Turismo kun Interpretado" de la **Atesto pri Kapableco** de FEI.
Ne necesas atesto pri supera lernado por partopreni tiun staĝon.

dua **STAĜO POR ĈIĈERONOJ**

Kvinpetalo, 14a-18a de majo 2015



Pri kio?

- Eroj kaj ecoj de ideala ekskurso

- laŭ la diversaj tipoj de ekskurso-celoj kaj ekskurseroj (vizitoj, komentoj...),
- laŭ la publiko (\pm diversa)
- laŭ la veturado / biciklado / piedirado
- fleksebleco ene de rigora kadro, adaptado al la cirkonstancoj
- utilaj kapabloj, kvalitoj, sintenoj (& mensa, korpa, emocia stato)

- Preparad-teknikoj

- mastrumi la tempon, la vojon, kie halti, ktp.
- divers-fakeco, trans-fakeco (de socipolitiko ĝis arkeologio tra popolkulturo...)
- kiam doni informojn, kiel, kie, kiom da...
- Adaptadi al la kultura diverseco de la kongresanoj
- Anticipadi

- Kiel gvidi ekskurson, unuope aŭ duope

- Grup-mastrumado
- Rilatado kun ŝoforo kaj aliaj kunlaborantoj (restoracio...)
- Publika parolado
- Tempo-mastrumado
- Rolo, sinteno kaj etiko de UK-ĉiĉerono

- ktp.

Kial, kiucele?

Ni celas altan kvaliton por la ekskursoj, kaj tio implicas multajn kompetentojn.
Ĉiu partoprenanto plibonigos kaj plidiversigos siajn, laŭ persona skemo, laŭ sia
aktuala nivelo en ĉiu el ili. Alta kvalito ne signifas elitajn kulturan nivelon, sed
kunigon de diversaj ecoj por plej kontentigi la ekskursantojn kaj plej efike vekti
ilian intereson, komprenemon, observemon kaj entuziasmon. Tiel ke ili memoru la
ekskurson kiel tre indan travivaĵon.

Kiel?

Ni kreos malkonkurencon, solidaran, ret-laboran etoson por preparadi la komunajn bazojn (pri urba & regiona historio, geografio, lingvo, arkitekturo kaj aliaj artoj, aktualeco kaj ceteraj kulturaj aspektoj) kaj la diversajn ekskursojn.

Kie? En Kvinpetalo!

Ĉarma kultura centro en ĉarma vilaĝo Bouresse kun bela romanika preĝejo, en tre alloga regiono, proksime de Poitiers. Plej proksima stacidomo: Lussac-les-Châteaux.

Hejmaj, tre bongustaj manĝoj.



Kiu gvidos?

Anne Amblès estas trejnisto pri team-kunlaborado kaj grup-vivigo, estis profesia internacia ĉiĉerono dum 15 jaroj, aktivadis pri justa turismo. Studis lingvojn, art-historion, turismon, konflikto-mastrumadon.

Kiam?

De ĵaŭdo 14a de majo 2015 (14a horo) ĝis lundo 18a (13a horo).

Kiom kostas?

Aliĝo 50 eŭroj. Tuttaga restado (tranokto, + 3 manĝoj) = 35 eŭroj. Por plentempa 4-taga restado, tio estos 50 + 140 do **190** eŭroj

- plus 12 € se vi ankoraŭ ne estas membro de SYM)

- minus 15 € por fruaj aliĝantoj (minimуме unu monaton antaŭe).

Kvankam tre preferindas partopreni la tuton, eblas ankaŭ partopreni nur parton.

Vidu la retejon de Kvinpetalo: <http://www.kvinpetalo.org/> pri aliĝo, restado, aliro ktp. Teknikaj demandoj pri via restado ĉe informoj@kvinpetalo.org aŭ moonmont@pt.lu. Laŭ bezone, pri enhavo kaj simile: anambles@free.fr.

Atentu krome:

Por la UK, necesos ĉiĉeronoj kaj helpantoj kun diversaj profiloj kaj disponebloj:

- por la tut-tagaj ekskursoj

- por duontagaj ekskursoj aŭ vizitoj.

- por traduki (interpreti) de la franca lingvo al Esperanto (kaj inverse pri la demandoj).

- se vi bone komprenas Esperanton sed ne tute parolas, vi povos esti helpanto!

Eblas gvidi ekskurson duope, ekzemple unu zorgas pri logistiko kaj grup-mastrumado, alia pri kultura enhavo, aŭ alia kombino laŭ la scipovoj de ambaŭ.

Tiu staĝo okazas dank'al aparta sponsorado de Esperanto-France por pagi profesiulon.

Porinforme: artikolo de Anne Amblès en la franca (2014):

<http://anambles.wordpress.com/2014/04/22/formation-guides-esperanto>